MONATA GAZETO DE E-HANDIKAPULOJ

# INFORMILO 12

DECEMBRO 2025 Kol. 484/41

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

**Enhavo**: Poemo Decembro, Kongreso de ĈEA en Havířov,
La 111-a UK, Rememoro, Gratulo kaj abonkotizo.

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

## Decembro

En Betlehemon iris rekta vojo,
la stelo brilis, ĉio estis sen ia ĝeno.
Dum religiaj kantoj
la revoj de la patroj pilgrimiris
sur malnova pont-ebeno.
Ĉu estis, ĉu ne estis Betlehemo?
Sed sur la pont-ebeno kreskas
rosmareno,
fidelaj pilgrimuloj turnas sin
silente,
kiam anstataŭ la Savonto
servistojn stalajn trovas.
Revenas ili kun la kredo,
ke venontjare super Betlehem´
la stelo certe staros
kaj tiu ne plu trompos.



Karel Toman – Monatoj
En Esperanton tradukis prof. Jaroslav Mráz (1933 – 2005)

# KONGRESO DE ĈEA EN HAVÍŘOV-TĚRLICKO

Dum la tagoj de la 17-a ĝis 19-a de oktobro ĉi-jare okazis en pitoreska, malnov-moderna gastejo en Těrlicko la 19-a Kongreso de ĈEA.

La komitatonoj venis jam la antaŭan tagon por prepari ĉion necesan por glata funkciado de la Kongreso – la plej streĉa tasko estis disloko de la partoprenantoj en ĉambrojn. La gastejo, Jaškovská krčma, kiu estas la plej malnova en nia lando (ĝi devenas el la jaro 1268), proponis al la organizantoj precize tiom da lokoj, kiom da homoj venis – 50.

Vendrede posttagmeze, la 17-an de oktobro, jam venadis la unuaj ĉeestantoj. Kvankam la alveno al la gastejo de la stacidomo Havířov, kien celis la plej multaj partoprenantoj, estis iom komplika (de la stacidomo oni devis veturi per aŭtobuso al la aŭtobusa stacidomo de Havířov, de tie per alia aŭtobuso al la stacio en Těrlicko kaj de tie piede atingi la gastejon), neniu perdiĝis.

Post akcepto de la partoprenantoj kaj ilia loĝigo sekvis komuna vespermanĝo en granda salono en la 1-a etaĝo. Tie poste okazis la vespera programo kaj fakte plua daŭrigo de la Kongreso.

La vesperan programon malfermis Petr Chrdle per la prelego pri Vuk Echtner (1905-1994), esperantisto kaj bahaisto, kiu estis instruisto de blindaj esperantistoj kaj la redaktoro de la revo Aŭroro, presita en Brajla skribo. Sekvis amuza parolado pri la ĉi -jara 110-a UK en Brno. La anoj de la preparkomitato kaj ĝiaj helpantoj transdonis siajn impresojn.

La vespero finiĝis per kantado ĉe gitarludo de la eminentaj Josef Kalčík kaj Vláďa Türk. Sabate antaŭtagmeze okazis kunsido de la ĈEA-anaro. Komence salutis la Kongreson vicurbestro de Havířov – liaj unuaj vortoj estis en Esperanto! Salutparolis ankaŭ de la prezidanto de la E-klubo en Havířov kaj la pola esperantisto Aleksander Zdechlik.

Poste sekvis jam traktado de la Kongreso: raporton pri agado de ĈEA dum la lastaj tri jaroj prezentis prezidanto de ĈEA Jiří Tomeček, pri mastrumado raportis la kasistino de ĈEA Andrea Švubová, pri E- kluboj Leonarda Chaloupková. La prezidanto taksis kiel la plej grandan sukceson de la agado de ĈEA la sukcesan organizon de la 110-a UK en Brno 2025. Koncerne la ekonomian administradon aperis propono pri plialtigo de membrokotizoj. La nova komitato havos taskon pritrakti la temon.




Oni nomis kvar novajn honorajn membrojn de ĈEA – gesinjorojn Oldřich A. Fischer, Jaroslav Maxmilián Kašparů,

Vlasta Pištíková kaj Jan Fidel Řepa. Ĉiuj meritas la aprezon por sia laboro en ĉeĥa Esperantujo!

Radmila Švejcarová, la prezidantino de balota komisiono, prezentis novajn anojn de komitato de ĈEA. La anaro konsentis kun propono de Radmila, ke la baloto de la komitatanoj estu komuna por ĉiuj adeptoj, kaj publika. Jiří Tomeček, proponita por posteno de prezidanto de ĈEA, informis pri tri ĉefaj taskoj por nova komitato por venontaj tri jaroj: pli efike komuniki kun ĉeĥa neesperantista publiko, pli bone informi ĉeĥajn esperantistojn pri agado de la komitato de ĈEA, revizii la Statuton de ĈEA (la ĝisnuna Statuto validas de la jaro 2012).

Post nelonga paŭzo la prezidantino de la balota komisiono alvokis la ĉeestantojn por baloti pri novaj anoj de la komitato. La ĉeestantoj aprobis ĉiujn anojn de la nova komitato – gesamideanojn Jiří Tomeček, Libuše Hýblová, Josef Kalčík, Andrea Švubová, Miroslav Malovec, Leonarda Chaloupková.

KOMPRENEBLE ONI SENĈESE SERĈAS HOMOJN, ESPERANTISTOJN, kiuj dezirus partopreni en laboro de ĈEA-komitato. Sekvis raporto de Petr Chrdle, ĉefdelegito de ĈEA por UEA. Dum ĉarma aŭtuna posttagmezo okazis promeno laŭlonge de la digolago Těrlicko. La promeno finiĝis en agrabla kafejo, de kie oni revenis al la gastejo-konferencejo. Nur tri kuraĝuloj ĉirkaŭiris la digolagon, kio implicas marŝi kelkajn kilometrojn.

De la 17-a horo daŭris la programo en la granda salono: “Ekparolu” de Milan Kolka, prezento de la libro Ĉapitroj de Romaa historio de Oldřich A. Fischer, “Reta babilado” de Josef Kalčík kaj amuza filmeto de E-mentala aranĝo 2025 – “Ĝuu

EsperantoN”. La sabatan programon kronis solena vespero kun bela muziko, dancado, riĉa tombolo kaj entute ĝoja, amikeca atmosfero. Dimanĉe antaŭtagmeze daŭris plu la oficiala programo. Josef Kalčík instigis la partoprenantojn por pripensi kelkajn partojn de la Statuto. Vladimír Türk prelegis pri historio de ĉeĥa trampado. Oni aŭdis lian rakontadon, kantadon kaj gitarludon kaj sekvis tiutempajn nigreblankajn filmetojn. Tre interesa prezentaĵo! La programo finiĝis per amuza “Komparo de tradukoj”. Mirka Tomečková, pere de lumbildo kaj trafa situacio prezentis ĉeĥan esprimivan vorton aŭ frazeton, la spektantoj divenis Esperanto-tradukon kaj nur poste aperis ĝusta traduko. Eminenta, sprita programero. Antaŭ tagmezo, preskaŭ precize, kiel estis planite, la prezidanto de ĈEA tralegis rezolucion de la Kongreso en Havířov-Těrlicko. Finiĝis sukcesa Kongreso, kiu plenumis ĉiujn erojn de sia planita programo. Koran dankon al anoj de E-klubo Havířov, kiuj sindone kunlabore kun la komitato de ĈEA aranĝis la Kongreson!

Leonarda Chaloupková

## La 111-A UK, GRAZ Unua (la plej favorpreza) aliĝperiodo jam finiĝis la 30-an de novembro 2025

Pli ol 290 homoj el 43 landoj jam aliĝis al la 111-a Universala Kongreso de Esperanto (UK), okazonta de la 1-a ĝis la 8-a de aŭgusto 2026 en Graz (Graco), Aŭstrio. Aliĝu ankaŭ vi ĉe uk.esperanto.net! Bonvolu atenti, ke ekde la 109-a UK okazis ŝanĝo pri la UK-aliĝperiodoj. Nuntempe la unua (plej favorpreza) aliĝperiodo finiĝos la 30-an de novembro 2025. La tria aliĝperiodo finiĝos la 30-an de junio 2026. Plenan informon trovu ĉe uk.esperanto.net/kotiztabelo.

La kongresa temo de la 111-a UK estas “Volontulado en la servo al daŭripova evoluigo”. Ĝi ligiĝas al la Internacia Jaro de Volontuloj por Daŭripova Evoluigo, kiel deklaris UN pri 2026. Aliĝu al la dissendolisto groups.io/g/Kongresa Temo por kontribui al la kongrestema programo de la UK. Proponi programerojn al la UK jam eblas per mallonge.net/UK26proponuprogrameron.

La emblemo de la 111-a UK reprezentas la “orientilon” de la urbo Graz – la Horloĝturon, kiu troviĝas sur la Kastela Monteto, pro tio videblan el pluraj punktoj de la urbo. La Unua Bulteno konsulteblas ĉe uk.esperanto.net/2026/unuabulteno. La Dua Bulteno enhavos utilajn informojn pri Graz kaj Aŭstrio ĝenerale, krom provizora programo de la UK kaj detaloj pri la mendeblaj hoteloj kaj ekskursoj kaj aliaj kongresaj aferoj.

Por partopreni en la 111-a UK bezonatas aliĝi ĉe uk.esperanto.net kaj ricevi konfirmon de la aliĝo kun la Kongresa Numero (KN). Individuaj membroj de UEA ĝuas grandan rabaton el la UK-kotizo. Se vi ankoraŭ ne remembriĝis en UEA, vi povas tion fari rekte per la UK-aliĝilo. En la aliĝilo eblas donaci al pluraj fondaĵoj kaj kontoj, kiuj subtenas la eventon kaj ebligas subvencii servojn, programerojn kaj pluraspektan inkluzivadon – kion ni kore dankas. Sekvu novaĵojn pri la Universala Kongreso en Telegram, Facebook kaj Instagram. El la Gazetaraj Komunikoj de UEA

**Karaj geamikoj,** kiel la tempo flugas. La 5-an de decembro pasas jam kvin jaroj de kiam mia patrino Jarmila Rýznarová (antaŭe Rybáčková) forlasis nin. Kaj tri monatojn poste forlasis nin tute neatendite ankaŭ mia pli juna fratino Lenka Angelová. Ŝi transprenis prezidantecon de AEH en la jaro 2012 de Pavel Nechvíle, kiu estis elektita kiel prezidanto de AEH en la jaro



2007 kaj bedaŭrinde ankaŭ li pasintjare forlasis nin. Do, mi kun Ludmila eldonas Informilon kaj Antaŭen jam preskaŭ kvin jarojn. Memoru ilin kun ni kaj ekbruligu kandelon honore al ili.

Ni deziras al vi ĉiuj agrablan Kristnaskon kaj feliĉan novan jaron 2026.

Viaj redaktorinoj Mirka Kosnarová kaj Ludmila Srbová.



Ludmila estas la plej longe servanta redaktorino de nia Informilo, ĉar ŝi komencis helpi jam kiam mia patrino transprenis prezidantecon de AEH de la fondinto de AEH samideano Josef Vaněček en la jaro 1998 kaj ŝi ne havis multan sperton pri tiu laboro. Ludmila ankoraŭ volonte helpas min ĝis hodiaŭ, kvankam ŝi estas 85-jara. Gratulon! Mirka

## Grava informo:

Karaj geamikoj, kvankam ni ne ŝatas tion, ni devas plialtigi la abonkotizon por nia Informilo. Certe ankaŭ vi rimarkis la plialtiĝon de la prezoj de ĉio, precipe de la poŝtkostoj, kiuj nun estas 30 Kč por letero en nian landon, kaj 50 Kč eksterlanden. Tio estas la kialo, pro kio ni devas plialtigi la abonkotizon ekde la venonta jaro. Post diskuto ni decidis, ke la jarabono de Informilo en kovertoj por abonantoj el eksterlando estos 22 € kaj por tiuj, kiuj ricevas ĝin interrete 11 €.
Por ĉeĥaj abonantoj la abonpago estos Kč 400,- kaj interrete Kč 200,-. Ankaŭ, nia komputilo, per kiu ni prilaboras nian gazeton, estas malnova kaj ni baldaŭ devos aĉeti la novan, por ke ni povu daŭrigi nian laboron.

Ni esperas, ke vi tamen restos anoj de AEH kaj legantoj de niaj Informilo kaj Antaŭen. Estraro de AEH

**INFORMILO** – monata gazeto por esperantistoj-handikapuloj + suplemento **ANTAŬEN**
Eldonas AEH – Asocio de esperantistoj-handikapuloj en Pardubice
Redaktoroj: Mirka Kosnarová, Ludmila Srbová
Adreso: Svaz zdravotně postižených esperantistů, Na Okrouhlíku 953/21,
530 03 PARDUBICE, CZ tel. **+420 721 537 970**
e-mail: **aeh@esperanto-aeh.eu** interreto: **www.esperanto-aeh.eu**
Banka kunligo: Fiobanko, kont-numero de AEH 2801322017, bank-kodo 2010
Bankovní spojení: Fio banka , číslo účtu AEH 2801322017, kód banky **2010**
**IBAN:** CZ3520100000002801322017 SWIFT/BIC: FIOBCZPPXXX
La jarabono de Informilo **20 €** (en kovertoj), aŭ **10 €** (e-mail)
Roční předplatné Informila **300,-Kč** (v obálkách), nebo 150,-Kč (v e-mailu)
Při platbách vždy uveďte vaše příjmení jako variabilní symbol! Příspěvek svazu AEH v dobrovolné výši.
Kotizo por AEH propravola. Kodo ĉe UEA: aehk-z
La redakcio ne ĉiam havas la saman opinion kiel la aŭtoroj de la artikoloj.